# *Sukcesoj de la kuba alfabetiga modelo tra la mondo.*




La kuba programo alfabetiga *Mi ja povas* alportis pozitivajn rezultojn al pli ol 8 milionoj da personoj kaj multaj landoj petas nuntempe la kunlaboron kuban por elradikigi analfabetecon.
Landoj kiel Nikaragvo, Bolivio kaj Venezuelo kaj la meksika ?tato de Michoacán, “sukcesis redukti la analfabetecon ?is malpli ol 4%, cifero kiu ebligas deklari ilin liberaj teritorioj je analfabetismo, klarigis estrarano de la pedagogia instituto por Latinameriko kaj Karibio, José del Real.
Li elstarigis ke de anta?nelonge, Ekvadoro ricevis la premion Re?o Sejong de UNESCO pro la rezultoj de la lastaj jaroj, kiuj havis grandan kontribuon de Kubo, tial ke ekde la jaro 2011 kaj ?is 2013 la insulo laboris tie per brigado el 55 kunlaborantoj.
La kuba pedagogo citita de la insula ?urnalo *Trabajadores*, memorigis ke la antila insulo entreprenis alfabetigan kampanjon en la 60-aj jaroj kaj poste evoluigis la batalojn por atingi la sesan kaj na?an gradon je tutlanda skalo.
Surbaze de tiuj spertoj, la lando kreis programojn kiel *Mi ja povas* kaj *Mi ja povas pluiri,* kies celoj estas altigi la eduknivelon ?is la 6-a grado de la lo?antaro adolta kaj gejunuloj kies nivelo estas analfabeta a? ne finita por poste kontribui al la procezoj alfabetigaj en la mondo.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/33030-sukcesoj-de-la-kuba-alfabetiga-modelo-tra-la-mondo

# Radio Habana Cuba